

Okdek jaroj de esperanta vivo, 3-a parto
Sinteno de Zamenhof
Claude Gacond, 173-a radioprelego, 1967.02.01 & 1967.02.04

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La Unua Libro de esperanto, kies antaŭparolon ni prezentis al vi dum du elsendoj, ne nur estis eldonita en la rusa lingvo. Jam en 1887 Doktoro Esperanto aperigis polan, francan kaj germanan tradukojn de tiu fundamenta verko.

A.- Zamenhof ne donis informojn pri la personoj, al kiuj li sendis sian broŝuron. Sed pro la sukceso de lia propagando oni povas esti certa, ke lia dissenda kampanjo estis detalege programita. Li provis atingi gvidantojn en plej diversaj landoj kaj medioj.

Cl.- La semoj do ne falis tute hazarde. Se tamen multaj perdiĝis, aliaj tuj ĝermis kaj rapide produktis fruktojn.

A.- Perdiĝis bedaŭrinde la korespondado inter Zamenhof kaj liaj unuaj adeptoj. Tamen la aludoj de Zamenhof al tiu korespondado ebligas dedukti, ke la leteroj ricevitaj en 1887 kaj 1888 dividiĝis verŝajne en du kategorioj.

Cl.- Unuj estis jam skribitaj en la Lingvo internacia kaj anoncis senkondiĉan kunlaboron. Tiuj korespondantoj postulis, ke oni kiel eble plej rapide eldonu librojn en tiu lingvo.

A.- Aliaj leteroj skribitaj ĝenerale nacilingve, alportis plej diversajn konsilojn pri laŭ ili endaj ŝanĝoj. Unue Zamenhof intencis publike diskuti tiujn proponojn pri reformoj de la Lingvo internacia. En la antaŭparolo al la *Dua Libro de l' lingvo internacia*, verko eldonita por respondi al la postuloj de la senkondiĉaj adeptoj, li avertis pri la baldaŭa eldono de kajeroj, kie la reform-proponoj estos diskutataj.

Cl.- Sed jam en la fino de tiu jaro 1888 Zamenhof rezignis pri tiu publika diskuto. *Aldono al la Dua Libro* anoncas la organizon de internacia kongreso far la Amerika Filozofia Societo en Filadelfio por debati pri la formo, kiun devos havi la internacia lingvo. Zamenhof decidis, ke sole simila manifestacio taŭgus por la malfermo de debato pri la ricevitaj proponoj de reformo de la Lingvo internacia.

A.- Konservigis kelkaj dokumentoj pri la lingvaj esploroj de Zamenhof. Ili atestas, ke antaŭ ol proponi sian lingvon Zamenhof estis provinta plej diversajn lingvo-projektojn. Unuj havis akuzativon, aliaj ne, en unuj la adjektivoj akordiĝis, en aliaj ne. Tiuj projektoj estis pli aŭ malpli naturalismaj, ktp.

Cl.- Ricevante proponojn pri ŝanĝoj Zamenhof nur povis plej ofte havi la impreson reveni al misaj praprojektoj. Jen ekzemple tion, kion li skribas pri la propono de la raportanto por la Amerika Filozofia Societo en Filadelfio :

A.- « *La kvar ŝanĝoj, kiujn proponas sinjoro Henry Philipps, estas teorie tre bonaj, sed mi jam mem antaŭ kelkaj jaroj pensis pri ili kaj mi trovis, ke praktike ili estus tre maloportunaj.* »

Cl.- Ĉar Zamenhof ne publikigis tiujn proponojn pri ŝanĝoj, oni ne konas la vidpunktojn de Henry Philipps kaj posedas tre malmulte da informoj pri la antaŭaj provoj de la aŭtoro de la Lingvo internacia.

A.- Tiu silentado pri reformoj kaj la tuja praktikado de la lingvo savis esperanton de danĝera situacio, kiu ĝenerale malservis ĉiujn kreitajn lingvojn.

Cl.- Paroli pri la indeco aŭ malindeco de gramatika finaĵo aŭ de la formo de radikoj estas unu afero. Praktiki la lingvon estas tute alia afero. Ambaŭ aferoj havas sian publikon. Rapide

Okdek jaroj de esperanta vivo, 3-a parto

Sinteno de Zamenhof

Claude Gacond, 173-a radioprelego, 1967.02.01 & 1967.02.04

Zamenhof preferis la praktikantojn al la ŝanĝemuloj, kiuj je liaj okuloj estas tro ofte la viktimoj de subjektivaj antaŭjuĝoj. Ili rigardas la eksteran aspekton de la aĵoj anstataŭ provi kompreni ilian kialon.

A.- La dinamismo de la esperanta movado estas ne nur klarigebla per la kvalitoj mem de la lingvo, sed ankaŭ per la decidemo de la unuaj praktikantoj de la lingvo, kiuj pli atentis la interhoman aspekton de la afero, ol la interlingvan. Ili uzis la ilon kaj vidis, ke ĝi bone funkcias, anstataŭ nur babili pri ĝia ebleco funkcii.

Cl.- En la *Aldono al la Dua Libro* Zamenhof ludas la rolon de lerta pedagogo. Li instigas la senkondiĉajn adeptojn tuj eklabori sen atendi konsilojn. Aŭdu :

A.- « *Multaj min demandas, per kio ili povas esti utilaj al la afero de l' lingvo internacia, kiel ili devas labori, kaj kiel oni povas la plej certe progresigi la aferon. Mia respondo nun devas esti :*

Cl.- *Ĉiu laboru tiel, kiel li trovos la plej bona, ĉar la sorto de l' afero estas nun egale en la manoj de ni ĉiuj. Celon ni ĉiuj havas unu kaj klaran :*

A.- *Ke la nombro de l' amikoj de l' lingvo internacia, la nombro de l' personoj uzantaj tiun lingvon kaj laborantaj por ĝi – konstante kresku, kaj ke la lingvo mem ĉiam pli riĉiĝu.*

Cl.- *Por tio, konkludas Zamenhof, ni ne bezonas kondukanton : Ĉia persono, ĉia rondeto, ĉia societo laboru laŭ sia bontrovo, en sia afero kaj laŭ siaj fortoj. »* (Fino de la citaĵo.)

A.- La egaleco inter la adeptoj de la lingvo internacia estis por Zamenhof punkto tre grava. Por li, ne devas ekzisti estro, kiu rajtus gvidi laŭ sia bondeziro la evoluon de naskiĝanta lingvo. Pro tio en tiu sama *Aldono al la Dua Libro* li asertas, ke estas neceso « *absolute apartigi la lingvon de la aŭtoro* ».

Cl.- Aŭdu plurajn dirojn de Zamenhof, kiuj komprenigas tiun neceson :

A.- « *Por igi la kritikistojn tute apartigi la aferon de la aŭtoro, mi publike diras mem, ke mi ne estas multege instruita lingvisto, ke mi estas tute senmerita kaj ne konata en la mondo. Mi scias, ke mia konfeso malvarmigis multajn por la afero, sed mi volas, ke oni juĝu ne l' aŭtoron, sed la verkon. »*

Cl.- « *Per kia vojo mi venis al la kreo de mia lingvo kaj laŭ kiaj metodoj mi laboris, laŭ mi tiu demando estas sen signifo : por la mondo estas gravaj sole la rezultatoj. »*

A.- « *Mi ne volas esti **kreinto** de l' lingvo, mi volas nur esti **iniciatoro**. »*

Cl.- Tiu sinteno de Zamenhof pruvas volon al objektiveco, kiu estas malofte ĉe persono, kiu ĵus naskis verkon. Inter la verkintoj de internaciaj lingvoj Zamenhof estas la sola, kiu unu jaron post la publikigo de la lingvo jam rezignis ludi gvidan rolon sur la evoluon de la lingvo. Jen eble ankaŭ kaŭzo al sukceso.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-